

Raportas Kubo 38 novajn kazojn kaj neniun forpason de Covid-19



Havano, jun 1 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi dimanĉo, oni konfirmis 38 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2083 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 429 pacientoj. Aliaj 1728 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanatento.

En tiu ĉi tago oni analizis 1763 samplajn, el kiuj 38 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 107 037 studitajn samplajn kaj 2083 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. El ili 36 estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 89,4% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj dum 132 el la kazoj venas el eksterlando. El la totalo konfirmita 52,2% estas sen simptomaj.

El la novaj kazoj 24 estis virinoj. El la 2083 pacientoj diagnozitaj, 172 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 83, kun indikilo de morteco je 4,17% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 16 rilate la mortec-indikilon en la regiono. Restas la nombro da du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 1826 jam rekuperintaj (17 pliaj hieraŭ). Neniu paciento estas en kriza stato kaj 3 en grava stato.

Ĝis sama dato la mondo akumulas pli ol 6 milionojn da kontaĵitoj pro tiu ĝi malsano kun indikilo de morteco je 6,12 % dum la amerika regiono havas proksimume 50,0% el ĝiuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 2 milionoj kaj duono. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 5,67%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo, la aŭtoritatoj insistas pri la bezono plu gardi la socialan izoligon por eviti revigliĝon de la nova kronviruso.

Dume la kuba registaro pritaksas la evoluon kaj preparas strategion por iri al rekuperiĝo kiam venu la momento en la venontaj monatoj.

<http://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/224348-raportas-kubo-38-novajn-kazojn-kaj-neniun-forpason-de-covid-19>



Radio Habana Cuba